

Unu frato pli

Vi ne povas ŝanĝi la teron.

Trankviligu vian

pasioplenan animon!

Nur unu aferon vi povas fari:

al alia persono ion bonan.

Sed ĉi tio jam estas tiom multe

ke la steloj mem ridetas.

Unu malpli malsata homo

signifas fraton pli.

Stig Dagerman Sveda verkisto (1923–1954)

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ philippe.cousson@sfr.fr

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
☎ +420 723 672 335;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':
CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Kungsgatan 13B; SE-281 54 Hässleholm; Svedio
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_board@yahoo.se

Kontrollegis: Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio. ✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

Enhavo

Novjara mesaĝo	123
Biblia vorto kaj mia penso	124
Ĉi tiu anonco, ĉi tiu mesaĝo, ĉi tiu signo	125
Titus Brandsma	129
Ekbruligi kandelon	132
Vilmos Apor	133
La trajno de la vivo	137
La Deklaracio de Barmen	138
Revolucio de digno	142
Informetoj	143
Aperis jam la stel' matena	144

Redaktoraj vortoj

Kara leganto, unue kaj plej grave, mi volas atentigi vin, ke la kongreso 2025 okazos unu semajnon pli frue pro neantaŭvideblaj kaj eksterkontrolaj kaŭzoj. Vidu informon sur paĝo 143!

Kiam mi, kiel junulo, laboris en Germanio, mi lernis himnon kun la refreno “Kuraĝu esti kiel Daniel”, kuraĝu stari sola! Kuraĝu havi celon firman! Kuraĝu sekvi ĝin. (libere tradukita el la angla “Dare to be a Daniel” de P. Bliss; germane “Bleibe fest wie Daniel, stehst du auch allein.”). Tiu himno revenis al mi, kiam mi preparis tiun ĉi numeron, ĉar en multaj tekstoj en la jena numero vi trovas homojn, kiuj, pro sia forta kaj firma fundamento, kuraĝis agi laŭ sia kredo kaj siaj bazaj valorjuĝoj. Kontraŭ potenco, kontraŭ ĉirkaŭa mondo.

Niaj agoj estu bazitaj sur tiu sama fundamento — nia kredo en nia Sinjoro.

Feliĉan Kristnaskon!

Novjara mesaĝo

Presidanto Philippe Cousson, FR

Luko 21:9, 29–30

9 Kaj kiam vi aŭdos pri militoj kaj tumultoj, ne teruriĝu; ĉar tio devas okazi unue, sed ne tuj estos la fino.

29 Kaj li parolis al ili parabolon: Rigardu la figarbon kaj ĉiujn arbojn;

30 kiam ili ekkreskigas foliojn, vi ekvidas, kaj el vi mem scias, ke la somero jam estas proksima.

Ni vivas en periodo, kiun ni tute ne antaŭvidis antaŭ 20 jaroj. Fakte preskaŭ neniam la militoj ĉesis en unu aŭ alia lando, sed nuntempe ili proksimiĝas. Ne nur tio, sed la klimato minacas. La bestoj malaperas iom post iom. La homoj, popoloj, gentoj disiĝas unu de la alia. Kaj kiel diris franca prezidento antaŭ kelkaj jaroj : “Ni rigardas aliloken”.

Multaj diras : ni certe trovos solvon, per scienco kaj tekniko, per ekvilibraj kontraktoj. Ĉu vi vere kredas tion ?

Estas ankaŭ aliaj kiuj teruriĝas kaj malesperas.

Philippe Cousson dum kongreso en Vác



La supre cititaj versikloj de la evangelio laŭ Luko apartenas al la lastaj paroladoj de la vivo de Jesuo, kaj estis uzitaj en la unua dimanĉo de Advento, kiam oni atendas la venon de la Savanto, la unuan venon ĉe Kristnasko. Oni povus supozi ke ili rilatas al la dua veno. Sed ĉu tie estas la lasta definitiva signifo de tiuj versikloj ? Ĉu oni ne povas diri ke ili rilatas al nia tempo ? Ne ĉar tiu nia tempo estus la fina tempo, sed ĉar ili koncernas nin nun.

Ne la katastrofajn signojn ni devus atenti, sed la burĝonadon de la arboj, ĉiujn etajn signojn kiuj montras al ni kie, kiam kaj kion ni devas esti preta agi, partopreni en la vivon de la Evangelio, en la *tikun olam*, la riparon de la mondo. Ne per grandegaj agoj, sed per fidelaj kaj modestaj oboj al la mesaĝo de la Evangelio, ami Dion el sia tuta koro, ktp. kaj la proksimulon kiel sin mem.

Nia mondo pli kaj pli freneziĝas, sed anstataŭ atenti la malesperigajn signojn, ni atentu la modestajn apenaŭ videblajn signojn kiuj esperigas nin kaj esperigas ĉirkaŭ ni.

Ni neniam ĉesu antaŭeniri apud Jesuo Kristo, kun Jesuo Kristo, nia amiko kiel li diris. Li estas la vojo, la vero kaj la vivo. Lian apudeston ni devas persone senti, atenti al tre variaj burĝonadoj, per signetoj. Ni ne devas rigardi aliloken.

Tiu nova jaro ne alportos alian mondon, ĉar la homoj estos samaj. Sed por kristano, ĉiu tago estas nova tago, nova tempo por esperi, por ami, por agi, por helpi, por paroli, por atesti. Ni ne mistrafu la signojn, eĉ la plej malgrandajn.

Ni vivas en la mondo, kaj devas ankaŭ zorgi pri ĝi ĉar ni vivas ene de ĝi, kiel diris Jeremia. Tamen ni ne estas el tiu mondo, kaj celas ion alian, vivas ion alian, fidon, esperon kaj amon. Ni atentu la burĝonadon de la arboj. La somero, la espero estas la realo kiun oni ankoraŭ ne komplete spertas.

Mi deziras al ĉiuj bonan novan jaron en fido, espero kaj amo.

Philippe Cousson

Karaj, do, jam denove Advento. Ĉu io ŝanĝiĝis en la granda mondo dum la pasinta jaro? Verŝajne ne. Ĉu io ŝanĝiĝis en via vivo, en via animo? Ĉu vi eble ŝanĝis ion en la vivo de tiuj homoj, kiuj ĉirkaŭas vin? Ĉu eble la vivon de iu nekonatulo, kiun vi hazarde renkontis sur la strato, per kelkaj kuraĝigaj vortoj, per amebla rideto? Mi esperas, ke jes. La mondo entute ne ŝanĝiĝas, tamen ni povas ŝanĝi la mondon, ankaŭ per ŝajne negravaj agoj de amo kaj ĝentileco. Kaj ni mem povas ŝanĝiĝi. La lumo venas en la mondon; ke li brilu ankaŭ sur vin

Jerald Veit

Marko 1:1–11

La komenco de la evangelio de Jesuo Kristo, Filo de Dio. Kiel estas skribite en la profeto Jesaja:

Jen Mi sendas Mian anĝelon antaŭ via vizaĝo, Kaj li preparos vian vojon;

Voĉo de krianto en la dezerto: Pretigu la vojon de la Eternulo, Rektigu Liajn irejojn;

Venis Johano, kiu baptis en la dezerto kaj predikis la bapton de pento por la pardonado de pekoj. Kaj eliris al li la tuta Juduja distrikto, kaj ĉiuj Jerusalemano; kaj ili estis baptitaj de li en la rivero Jordan, konfesante siajn pekojn. Kaj Johano estis vestita per kamelharaĵo kaj leda zono ĉirkaŭ siaj lumboj, kaj li manĝadis akridojn kaj sovaĝan mielon. Kaj li predikis, dirante: Venas post mi tiu, kiu estas pli potenca ol mi; la rimemon de liaj ŝuoj mi ne estas inda, kliniĝinte, malligi. Mi vin baptis per akvo; sed li vin baptos per la Sankta Spirito.

Kaj en tiuj tagoj Jesuo venis el Nazaret de Galileo, kaj estis baptita de Johano en Jordan. Kaj tuj kiam li eliris el la akvo, li vidis la ĉielon fenditan, kaj la Spiriton kiel kolombo malsuprenirantan sur lin; kaj venis voĉo el la ĉielo: Vi estas Mia Filo, la amata, en kiu Mi havas plezuron.

Ĉi tiu anonco, ĉi tiu mesaĝo, ĉi tiu signo

Prediko dum reta diservo la 25an de decembro 2022

Philippe Cousson, FR

10 Kaj plue diris la Eternulo: Diru al Aĥaz jene: 11 Petu por vi signon de la Eternulo, via Dio, ĉu profunde malsupre, ĉu alte supre. 12 Sed Aĥaz diris: Mi ne petos, kaj mi ne incitos la Eternulon. 13 Kaj li diris: Aŭskultu, domo de David: ĉu ne sufiĉas al vi ĉagreni homojn, ke vi ĉagrenas eĉ mian Dion? 14 Tial la Sinjoro mem donos al vi signon: jen virgulino gravediĝis, kaj ŝi naskos filon, kaj ŝi donos al li la nomon Emanuel. 15 Buteron kaj mielon li manĝos, ĝis li povoscios forpuŝi malbonon kaj elekti bonon. 16 Sed antaŭ ol la knabo povoscios forpuŝi malbonon kaj elekti bonon, estos forlasita tiu lando, kiun vi timas pro ĝiaj du reĝoj.

Jesaja 7:10-16

Karaj gefratoj en Kristo. Jen tri tekstoj (vidu ankaŭ la sekvajn paĝojn) kunligitaj de nia liturgia legolisto por la kvara Adventa dimanĉo. Du el ili parolas pri naskiĝo, du el ili parolas pri Jesuo Kristo. Kaj poste...

Ni vidu la rolulojn.

En la unua, tiu de la libro de Jesaja, ni trovas, Jesajan, kompreneble, la profeton, la reĝon Aĥaz kaj Dion mem, indikitaj dufoje per la tetragramo, unufoje per Sinjoro kaj unufoje per “mia Dio”.

Philippe Cousson dum reta diservo



En la teksto de la epistolo al la Romanoj, ni trovas Paŭlon, kaj li parolas pri Jesuo Kristo, pri Dio, pri David, pri la kristanoj de Romo kaj pri la Sankta Spirito.

En la peco de la Evangelio laŭ Mateo, ni trovas Jozefon, la anĝelon kaj oni parolas pri Jesuo Kristo, pri Maria kaj pri la Sankta Spirito, denove, kaj pri Dio kiel “la Sinjoro”.

Mi revenos al la reĝo Aĥaz kaj Jozefo pli poste.

Ni vidu nun ĉi tiujn tri rolulojn: la profeton Jesaja, la apostolon Paŭlo kaj la anĝelon de la Sinjoro, al kiu Luko donas nomon, Gabriel. Ili estas unu el la komunaj elementoj de ĉi tiu grupo. La profeto, la apostolo kaj la anĝelo estas mesaĝistoj, anoncantoj, portantoj de parolo, de mesaĝoj. Ili estas portantoj de bona novaĵo, de la Evangelio.

En la unua teksto, la bona novaĵo rilatas al minaco de invado de la suda

regno, de Judujo fare de la armeoj de la reĝo de la Nordo, de Israelo kaj de la reĝo de Sirio. La reĝo Aĥaz, kiu tamen ricevis de la profeto la vorton de Dio, kiu diras, ke li ne estos venkita, serĉas solvon sen la helpo de Dio. Ĉi tiu reĝo Aĥaz estas en la listo de la reĝoj de Judujo, kiuj faras malbonon antaŭ la okuloj de la Eternulo. Dum lia tempo la profeto Miĥa parolis, citita en la rakonto de la Saĝuloj. Ne tia estis la kazo de lia filo Ĥizkija. Aĥaz do timas ĉi tiujn du reĝojn, kiuj minacas lin. Li tiam turnas sin al la malproksima potenca reĝo de Asirio, Tiglat Pileser, kiu efektive liberigos lin. Kaj poste, Aĥaz forprenos la trezorojn de la templo por doni ĉi tiujn riĉaĵojn al la Asiriano.

Kial li ne fidis la Eternulon, Dion de David, Lian patron? Ni scias, ke li ankaŭ adoris aliajn diojn ĝis praktiki homajn oferojn laŭ la tekstoj. Se, kiam la minaco ĉeestis, li rifuzis la signon, kiun Dio proponis al li, rekte, kio vere ne estas ofta, ĉu estis pro oboe? Readmono 6:16 postulas, ke oni ne petas signon por ne inciti la Sinjoron. Nu, la libro de Readmono povas esti pli malfrua, sed ni jam trovas la ideon ĉi tie. Aŭ alie, li simple rifuzis, ĉar li ne metis sian fidon al ĉi tiu Dio, kiu ne plu estis lia, aŭ ne plu estis lia sola.

Estas do la profeto, kiu diras al li, ke malgraŭ lia rifuzo, la signo estos donita.

Signo, ne vere eksterordinara, juna knabino, kiu estas graveda kaj kiu naskas filon. Kio povus esti pli banala?

Lia nomo estas malpli: Emanuel, Dio kun ni. Ne vere la pensmaniero de Aĥaz, kiu iros ĝis meti en la templon altaron faritan laŭ la modelo de pagana altaro en Damasko. Tamen, la tero, la grundo de la du reĝoj, kiuj tiom timigis lin, estos forlasita. Kaj efektive, jarojn poste, la posteulo de Tiglat Pileser, Ŝalmaneser prenis Samarion kaj finis la Regnojn de Israelo kaj Sirio.

Signo, kio estas signo? Malgraŭ la malpermeso, ekzistas petoj por signo de Dio. Por kio signo povas esti uzata? Pruvo, elmontro? Ĝi foje povas plifortigi la fidon, sed se la fido ne estas tie, ĝi pravas nenion, ĝi ne instalas la kredon. Plej malbone ĝi alprenas magian karakteron. Signo ne estas nepre sensacia, ne nepre signo de potenco. Ĝi povas esti kiel en la Evangelio de Johano kie tio, kion ni nomas mirakloj, estas nomataj signoj. La signo estas ĉi tie pro sia signifo, pro la mesaĝo kiun ĝi enhavas, kiun ĝi plifortigas, kiun ĝi tradukas. Nuntempe oni diras, ke “la komunikilo estas la mesaĝo”.

Por Aĥaz, kiel por Paŭlo, kiel por Jozefo, la signo portas mesaĝon de savo, de liberigo, de repaciĝo, bonan novaĵon, evangelion de graco kaj paco, de savo el pekoj, por la homoj kaj por la nacioj... Ĝi

Paŭlo, servisto de Jesuo Kristo, apostolo vokita, apartigita al la evangelio de Dio, 2 kiun Li promesis antaŭe per Siaj profetoj en la sanktaj skriboj, 3 pri Sia Filo, kiu naskiĝis el la idaro de David laŭ la karno, 4 la difinita Filo de Dio en potenco laŭ la Spirito de sankteco per la releviĝo de la mortintoj — Jesuo Kristo, nia Sinjoro, 5 per kiu ni ricevis gracon kaj apostolecon por obeemo de fido ĉe ĉiuj nacioj pro lia nomo, 6 inter kiuj estas ankaŭ vi, vokitaj de Jesuo Kristo; 7 al ĉiuj, kiuj estas en Romo, amataj de Dio, vokitaj sanktuloj: Graco al vi kaj paco de Dio, nia Patro, kaj de la Sinjoro Jesuo Kristo.

Romanoj 1:1-7

estas mesaĝo, kiu anoncas la eblecon de nova komenco, kiu restarigas la rilaton inter homoj, inter Dio kaj homoj, inter nacioj.

Paŭlo portis ĉi tiun mesaĝon, Aĥaz neglektis aŭ rifuzis ĝin kaj Jozefo prenis ĝin por si, enprenis ĝin. Li transformis tiun ĉi mesaĝon en agon de fido, agon de vivo, prenante kun si la patrino kaj poste la infanon.

Elemento de la signo estas la nomo donita al la infano, aŭ pli ĝuste la nomo kriita. Ĉar kaj en la hebrea kaj en la greka, kiam oni vokas la infanon per nomo, kiam oni donas al li nomon, voki kaj kribi, tio estas la sama vorto.

Sed, atentu, por Jesaja, estas la patrino, kiu nomas kaj por Mateo estas la patro, Jozefo, kiu decidis, akceptis adopti ĉi tiun infanon, la infanon de Dio.

Alia diferenco: Se ni rigardas la nomojn de la infano simple en ĉi tiu teksto de Mateo, ni havas plurajn eblecojn.

Ĉar la teksto de Jesaja estas citita, la nomo de la profetaĵo estas Emanuel, “Dio kun ni”. Kia promeso!

Sed kiel la anĝelo demandis lin, Jozefo nomas lin Jesuo, tio estas “Dio savas”. Dio, la Sinjoro, certe ne nur ni mem.

La tekstopeco komenciĝas per: Jen la origino, la genezo, de Jesuo Kristo. Tria nomo. Kristo, la Mesio, la sanktoleito, tiu, kiu ricevis la sanktoleadon, kiu faras la reĝojn, la profetojn kaj la pastrojn. Ĉar Jozefo estas nomumita kiel filo de David, la infano ankaŭ estas filo de David, posteulo de la granda reĝo.

Ĉar li venas de la Sankta Spirito, li ankaŭ estas filo de Dio, tio estas ne nur homo, sed ankaŭ Dio enkarniĝinta, kiu venis inter la homoj.

Mi revenos iomete al Jozefo kaj lia fido. Kiel konstruanto, domkonstruanto, li sciis, ke “se la Eternulo ne konstruas la domon, tiam vane laboras super ĝi ĝiaj konstruantoj” laŭ Psalmo 127.

Malnova tradukeraro igis lin ĉarpentisto, sed li verŝajne pritraktis ŝtonon plej verŝajne ne lignon. Li estas prezentita kiel justa. Homo de fido, justulo, kia pli bona patro por ĉi tiu infano?

18 Kaj la naskiĝo de Jesuo Kristo estis tiamaniere: kiam lia patrino Maria estis fianĉin-igita al Jozef, antaŭ ol ili kunvenis, ŝi troviĝis graveda per la Sankta Spirito. 19 Kaj ŝia edzo Jozef, estante justulo, kaj ne volante meti ŝin al publika malhonoro, volis ŝin sekrete forsendi. 20 Sed kiam li pripensis tion, jen anĝelo de la Eternulo aperis al li en sonĝo, dirante: Jozef, filo de David, ne timu preni al vi vian edzinon Maria; ĉar tio, kio naskiĝos de ŝi, estas per la Sankta Spirito. 21 Kaj ŝi naskos filon; kaj vi nomos lin JESUO; ĉar li savos sian popolon de ĝiaj pekoj. 22 Kaj ĉio tio okazis, por ke plenumiĝu tio, kion la Eternulo parolis per la profeto, dirante: 23 Jen virgulino gravediĝos kaj naskos filon, Kaj oni donos al li la nomon Emanuel; tio estas, Dio kun ni. 24 Kaj Jozef, leviĝinte el sia dormo, faris, kiel ordonis al li la anĝelo de la Eternulo, kaj prenis al si sian edzinon; 25 kaj li ne ekkonis ŝin, ĝis ŝi naskis filon; kaj li donis al li la nomon JESUO.

Mateo 1:18-25

Paŭlo ankaŭ estis vokita. Li falis de sia ĉevalo pro ĉi tio. Estis nova vivo por li. Li respondis al tiu ĉi voko, li fariĝis sendito, apostolo de la Evangelio. Li portis ĉi tiun mesaĝon. Li vivis ĉi tiun mesaĝon. Kaj ĉi tiu voko estis markita per nova nomo. De Saul li fariĝis Paŭlo.

Ni ĉiuj, kiuj iam ricevis alvokon, ne nepre por esti apostolo, sed certe por vivi kaj anonci ĉi tiun Evangelion, ni estas filoj de la promeso kaj vokitaj vivi ĝin, atesti pri ĝi.

Ni estu por niaj samtempuloj per niaj agoj, niaj sintenoj kaj niaj vortoj ĉi tiu signo!

La unua versiklo de la perikopo el Jesaja diras al ni, ke la Sinjoro daŭre parolis. Li iom pli frue faris promeson al Aĥaz, sed ĉar ĉi-lastata ne aliĝis al ĝi, li daŭrigis insistante pri la signo. Aĥaz ne estis reĝo laŭ la koro de la Eternulo, male al sia filo Ĥizkija, kiu malgraŭ iom da miskonduto restis fidela al la fido de sia prapatro David. Kaj Aĥaz kaj Ĥizkija aperas en la genealogio de Jesuo komence de la Evangelio laŭ Mateo.

Eĉ se li estas agnoskita de la kredantoj kiel filo de Dio, li ankaŭ portas en si ĉiujn spertojn de la homaro per siaj homaj prapatroj, sukcesojn kaj malsukcesojn, bonfarojn kaj pekojn. Li kunigas, li resumas la homaron en si mem, la sorton de la tuta homaro, kiun li portos al la kruco kaj revenigos la vivon per sia releviĝo el la mortintoj, kiel Paŭlo memorigas nin.

Do jen ĉi tiu voko, ĉi tiu mesaĝo, ĉi tiu bona novaĵo, alportita de la anĝeloj, la profetoj, la apostoloj. Jen do ĉi tiu anonco, ĉi tiu mesaĝo, ĉi tiu signo, kiun ni ankaŭ devas porti, transdoni, vivi.

Ĉu ni scipovos, helpe de la Sankta Spirito, malakcepti tion malbonan kaj elekti tion bonan, ĉu ni scipovos legi la signojn, kiuj estos metitaj antaŭ ni, ĉu ni scipovos aŭdi la vokojn, vokojn de Dio kaj vokojn de homoj apud ni? La bona novaĵo promesita de la profetoj, la anĝeloj kaj la apostoloj, estas por ni kaj por tiuj, al kiuj ni apudestos ĉu proksime, ĉu pli malproksime, se ankaŭ ni scipovas esti signoj de la Evangelio de Jesuo Kristo.

Kristnasko signas por ĉiuj kristanoj la venon de la Savanto kiel malforta infano. Ĝi estas la preludo al vivo de atestanto kaj al la ĉefa evento por savo, kiujn kune konsistigas la kruco kaj la malplena tombo. Ĝi estas la origino, la genezo, kiel Mateo diras ĉi tie, de tio, kio estos la vivo, la vortoj kaj la agoj de Jesuo, Kristo kaj Emanuel, filo de Dio kaj filo de Maria kaj Jozefo. Do, estas neniu bona Kristnaska novaĵo sen Pasko. Neniu atestanto de la Eklezio sen la atesto de kristanoj. Neniu signo de kristana vivo sen la obeo de fido. Ni estu por niaj samtempuloj per niaj agoj, niaj sintenoj kaj niaj vortoj ĉi tiu signo, ĉi tiu alvoko, ĉi tiu anonco de la Evangelio de tiu, kiun rememorigas Kristnasko, for de la bruoj de forgesema festo.

Amen.

Venu Sinjoro Jesuo.

Esperantisto, martiro, patrono de IKUE

T*itus Brandsma*, (en Esperanto ankaŭ kiel Tito Brandsma), origine nomata *Anno Sjoerd Brandsma* (naskiĝis la 23-an de februaro 1881 en Oegeklooster apud Bolsward, NL, mortis la 26-an de julio 1942 en la koncentrejo Dachau pro siaj kontraŭnaziaj agadoj).


Li estis frisa karmelana patro, profesoro pri filozofio, ĵurnalisto, verkisto, tradukisto, kontraŭnazia martiro kaj esperantisto. La Katolika Eklezio kanonizis lin kiel martiron la 15-an de majo 2022. Lia liturgia memortago estas la 27-an de julio.

La Internacia Asocio de Katolikaj Esperantistoj (IKUE) faris de Titus Brandsma unu el siaj patronoj kaj li atingis la 42-an lokon en la televida enketo “La Plej granda Nederlandano”.

Biografio

Ĉe naskiĝo li ricevis la nomon Anno Sjoerd [elparolu ano ŝjurd]. Post aliĝo al la Karmelana ordeno, li prenis la monaĥan nomon de Titus (Tito).

En 1905 li estis ordinata pastro. Post ordigo, li studis en Romo, en 1909 li ricevis sian Ph.D. Tiam Brandsma revenis al sia patrujo, kie li instruis filo-



Titus Brandsma, karmelano kaj esperantisto. Nekonata fotisto. Vikipedio. Publika havaĵo.

zofion en kelkaj edukaj institucioj. Brandsma okupiĝis pri la studo de la karmelita mistikismo, unu el liaj meritoj estis la traduko al la nederlanda de la verkoj de sankta Tereza de Avila.

Titus Brandsma iĝis unu el la fondintoj en 1923 de la unua Katolika Univer-

sitato en Nederlando en Nimego (Nijmegen). Tie li instruis filozofion kaj la historion de mistikismo. Poste li iĝis rektoro de tiu universitato. Li ankaŭ faris multe da ĵurnalisma laboro, kunlaboris kun multaj katolikaj eldonaĵoj en Nederlando kaj aliaj landoj en Eŭropo.

Jam antaŭ la nazia invado en Nederlandon en 1940, Brandsma esprimis reziston kontraŭ la nazia ideologio. Li alvokis la katolikan gazetaron de la lando ne fari nazian propagandon. En publikaj paroladoj li emfazis la nekongruecon de naziismo kun la katolika kredo kaj protestis kontraŭ la persekutado de judoj.

En januaro 1942 Brandsma estis arestita. Post mallonga restado en pluraj nederlandaj tendaroj por kaptitoj li estis translokita al la koncentrejo Dachau. La 26-an de julio 1942 Titus Brandsma estis mortigita per mortiga injekto. La tendara flegistino, kiu donis la mortigan injekton, poste pentis kaj atestis ĉe la beatigo de Titus Brandsma.

Titus Brandsma estis ankaŭ specialisto pri mezepoka mistikismo kaj li mem estis mistikulo. Li estis membro de la tutmonda ordeno de karmelanoj. Li estis membro de la naturprotekta organizaĵo *Fryske Gea* kaj kunfondinto de la *Fryske Akademy*, lingva akademio pri la frisa lingvo.

Vivo sub nazia diktaturo

En frua stadio Brandsma avertis pri la danĝeroj de naziismo, instigo al rasa malamo per publikaĵoj en gazetoj, revuoj kaj dum prelegoj. Ekzemple, meze de 1936 li estis membro de la nederlanda Komitato de Atentemo kontraŭ Naci-

socialismo, starigita de nederlandaj akademianoj kaj artistoj. En Nederlando li estis inter la unuaj opoziciantoj kontraŭ la nazia diktaturo kaj skribe kaj predike kaj lerninstrue kondamnis kaj kondamnis la persekutadon kontraŭ la judoj. Pro tio li estis arestita de la Gestapo la 19-an de januaro 1942, deportita al Dachau kaj mortigita per injekto administrita de la koncentreja kuracisto, ĉar “konsiderita – laŭ gestapa raporto sendita al Berlino – malamiko al la nacionalsocialismo”. Pro tia raporto fiaskis ĉiuj intervenoj de diversaj amikaj kaj katolikaj aŭtoritatuloj, por ke lia kondamno estu ŝanĝita al dumviva karcero. Li mortis preĝante ĝisfine por siaj persekutantoj.

Konformaj atestoj de liaj kunfratoj kaj konstantaj deklaroj de kuntorturitoj kaj enlagerigitoj, pri lia senkondiĉa kristana amo al ĉiuj, instigis papon Johanon Paŭlon la 2-an koncedi, ke ekmarŝu la kanona proceso por la eventuala laŭeklezia beatigo.

En 1982 li estis postmorte premiita per la Memora Kruco de la Nederlanda Rezisto.

Kanonizo

La kanonizo (sinonimo “enkanonigo”) estas kompleksa proceso, kiu kondukas al la sanktigo de personoj, pasante tra la ŝtupoj de deklaro de “heroaj virtoj” kaj beatigo.

En novembro 1985 Papo Johano Paŭlo la 2-a beatigis lin kiel martiro, la lastan paŝon sur la vojo al sanktigo.

La 15-an de majo 2022 Papo Francisko enkanonizis lin en Vatikano ĉeestinte la publikan ordinaran konsisto-

rion por la proklamo de dekretoj por tri novaj sanktuloj, inter ili Titus Brandsma.

La 25-an de novembro 2021 estis sciigo de la Vatikano, ke Brandsma estus enkanonizita fare de la papo. Dum la konsistorio de la 4-a de marto 2022, Papo Francisko anoncis la kanonizon de Titus Brandsma kaj naŭ aliaj beatigitaj personoj por la 15-a de majo 2022.

Ne estas unike, ke katoliko, kiu mortis en nazia koncentrejo estis sanktigita. Tio okazis pli frue kun la pola pastro Maksimiliano Kolbe en 1982 kaj la germana monaĥino Edith Stein en 1998. Ambaŭ estis mortigitaj en Aŭŝvico [germane: Auschwitz].

Esperanta vivo

Titus Brandsma estis esperantisto kaj membro de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. En malnovaj jarlibroj de IKUE (ekzemple de la jaroj 1926, 1928 kaj 1931–1932) aperis lia nomo kaj adreso. Brandsma pioniris en la organizado kaj direktado de la katolika verkistaro kaj Ekumena Movado: en tiuj aktivadoj li utiligis ankaŭ Esperanton.

Okaze de la 4-a jarkunveno de “Nederlanda Katoliko” (Nederlanda Katolika Esperantista Ligo), en 1913 en ’s-Hertogenbosch li celebris la meson por la vivantaj kaj mortintaj membroj. Li estis inter la organizantoj de la Kongreso de Nederlanda Katoliko (’s-Hertogenbosch, 1934), same inter la membroj de honora komitato kaj ankaŭ inter la partoprenantoj de la 19-a IKUE kongreso (1937, Hago).

En Francio ekzistas internacia ĵurnalista premio, kiu portas lian nomon (Prix

Titus Brandsma), kiu estas aljuĝata unufoje ĉiun trian jaron al ĵurnalisto, publikaĵo aŭ institucio, kiu suferis pro minacoj aŭ persekutadoj kaj pro la engaĝo en la gazetaro favore al grava homa aŭ kristana temo.

Memorlokoj kaj monumentoj

En multaj lokoj en Nederlando kaj eksterlande (Francio, Germanio, Irlando, Pollando) iuj lernejoj, preĝejoj kaj stratoj estas nomitaj laŭ Titus Brandsma. La Titus Brandsma Memorial (Titus Brandsma Gedachteniskerk) en Nimego posedas murpanelojn dezajnitajn de artistoj pri la vivo kaj spirita vojo de Brandsma, samkiel vitrinojn kun objektoj kaj dokumentoj pri lia vivo. En 2005 Brandsma estis elektita fare de la loĝantaro de Nimego kiel la plej granda loĝanto en la historio de ilia urbo.

Ĉe la Radboda Universitato en Nimego estas Titus Brandsma Instituto, kiu ekde 1993, ĉiujare, en la memoro de Titus Brandsma organizas prelegojn, kiuj estas interfake orientitaj: filozofio, teologio, historio, arthistorio kaj psikologio.

En Bolsward estas muzeo Titus Brandsma, kie estas prezentitaj multaj informoj pri li.

La nederlandaj publikaj transportkompanioj Veolia kaj Arriva nomis trajnotipon laŭ Titus Brandsma. ☞



Informpanelo ĉe la Brandsmastraat en Gouda.
Fotis Agaath. Vikipedio CC BY-SA 3.0



Ĝojplenan kristnaskan feston & Sukcesan novan jaron

al ĉiu leganto de Dia Regno deziras
la sekretario & distribuanto kaj la redaktoro

Pavel POLNICKIJ &
Bengt Olof ÅRADSSON

Ekbruligi kandelon

La adventa kandelingo jam sur tablo.
Nun estas tiu tempo
– mi sekvas la tradiciojn
– ne nur pro malnova kutimo.
Ne,
ĉar estas malluma tempo,
la mondo estas plena da milito, malsato kaj mizero.
Sed pli bone ekbruligi kandelon
ol malbeni la mallumon.
La plej malbona ago, kiun mi povus fari
estus ĉesi zorgi,
kaj ĉesi esperi.
Ŝajnas, ke mi povas fari tiom malmulte.
Kiel mi povus plibonigi la mondon?
Sed ĉu mi povas disvastigi iom da lumo en la mallumo,
tiam mi tion volas fari.
Se mi sukcesas ridetigi iun
kaj se mi povas etendi helpan manon,
tiam mi intencas tion fari.
Se mi volas plu nomi min homo
ne ekzistas alternativo.

Urban Önell

Frilagt.se

Esperantigis Bengt Olof Åradsson

Vilmos Apor

La kristana kongreso 2024 okazis en *Vilmos Apor* altlernejo, Vác

Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

*La kruco fortigas la malfortulon,
malsovaĝigas la fortulon.*

Vilmos Apor

La familio Apor venis el Transsilvanio. Vilmos naskiĝis kiel la tria infano la 29-an de februaro 1892 en Segesvár. Post kelkaj jaroj la familio translokiĝis al Vieno pro ŝanĝo en la servo de la patro. Gábor Apor mortis neatendite en 1898, kaj la patrino, Fidélia Pálffy, tiam edukis siajn infanojn en Vieno, de kiuj ŝi postulis disciplinon, senpretecon kaj akuratecon. Jen kion ŝi diris al ili: “Kiam vi venas al vojkruciĝo, elektu ĉiam la pli malfacilan, ĉar certe ĝi estas la ĝusta vojo.”

Vilmos Apor finis mezlernejon en Kalksburg, Aŭstrio kaj Kalocsa, Hungario ĉe la jezuitoj. Post tio, li kandidatiĝis al la seminario de la Diocezo de Győr, kie li estis bonvenigita fare de grafo Miklós Széchenyi, kiu estis parenca al la Apor-familio, kaj sendis lin por studi en la Universitato de Innsbruck. Lia pastra programo estis establita ĉi tie. Li klare vidis, ke la pastra vivo estas vojo de rezigno kaj devas esti karakterizita per pacienco, mildeco kaj senlaca laboro.



“Efektive, mi sentas, ke la lasta beat-eco estas adresita al la pastro-apostolo, ‘feliĉaj estas tiuj, kiuj estas persekutitaj kaj tiuj, kiuj suferas pro justeco’. Jen la feliĉo de la pastro, sinofero, vivofero kaj martireco”, estas en la manuskripto-notoj de Vilmos Apor.

Antaŭ ol li estis ordinita subdiakono, li skribis en sia taglibro: “Mi alfrontas la plej gravan decidon de mia vivo kaj mi prepariĝas por ĝi. La tri pli altaj ordonoj,

kiujn mi prenas nun, estas kiel la najloj, kiuj fiksas min al la kruco de Kristo dum mia tuta vivo. Ho, dolĉa kaj aminda servuto, per kiu oni fariĝas justa, libera kaj sankta!”

Vilmos Apor estis ordinita pastro la 24-an de aŭgusto 1915 de Sigmund Waitz, helpepiskopo de Brixen. Li komencis sian laboron en la Diocezo de Nagyvárad, kien episkopo Miklós Széchenyi, kiu estis translokigita tien en 1911, kunportis lin. En la somero de 1918, li estis nomumita paroĥestro en Gyula, kie li antaŭe funkciis kiel armea pastro. Li kredis ke “la paroĥa pastro estas la vera pastro”. Li vivis kun strikta horaro, dediĉis sian liberan tempon al studo kaj memkultivado, estis karakterizita per asketa disciplino al si mem, sed bonkoreco kaj konsidero al aliaj. Dum sia pastoreca agado, li fondis katolikan gazeton, faris religian edukadon, vizitis kaptitojn, helpis malriĉulojn kaj malsanulojn. Li donacis konsiderindajn sumojn al bonfarado – ekzemple, ĉe Kristnasko 1925, li fordonis la plej grandan parton de la manĝaĵ-provizo de la paroĥo kaj ĝian tutan monon.



Katolika Altlernejo Vilmos Apor, kie okazis la KELI-kongreso 2024, Fotis: Ediedi. CC BY-SA 3.0 Wikipedia

Dum sia servado kiel paroĥestro, li prenis sur sin la plej malfacilajn taskojn. Li laboris kun siaj sub-pastroj en spirito de reciproka respekto kaj amikeco. Li volonte aŭskultis la konfesojn ĉar la volo, kompreni la alian homon, estis plej efika en la konfesejo. Kiel spirita gvidanto li strebis evoluigi ĉiun venkan spiritan forton, disciplinon kaj amon al justeco en siaj sekvantoj.

La 21-an de januaro 1941 li ricevis de la papa nuncio leteron, laŭ kiu la Sankta Papo nomumis lin episkopo de Győr. La episkopa konsekro la 24-an de februaro, kiun ĉeestis ne nur la ĉefpastroj kaj eminentuloj, sed ankaŭ la malriĉaj kredantoj, restis memorinda en la historio de Gyula dum jardekoj.

Vilmos Apor alvenis en Győr la 1-an de marto en 1941, kaj la oficiala inaŭguro okazis la sekvan tagon. La iama paroĥestro de Gyula regis kun humaneco kaj humileco en sia nova pozicio, nun ankaŭ kiel episkopo.

En sia unua rondletero, li skizis sian paŝtistan programon: “La laboro por animoj, la amo kaj pasio por animoj, la deziro ‘ĉiu homo havu ĉion’ faras la pastran vivon bela kaj kapabla je ĉiuj oferoj.”

Post la validiĝo de la tria leĝo kontraŭ la judoj en 1941, li komencis sian laboron kiel episkopo kaj profunde sentis la respondecon de la Eklezio, sed liaj protestoj, petoj kaj telegramoj senditaj en la intereso de la judoj estis ne responditaj. Li kaŝis kelkajn el tiuj, kiuj venis al li, aŭ sendis ilin al nuncio Angelo Rotta aŭ lia fratino, Gizella Apor, kiu estis la estro de la Hungara Ruĝa Kruco.



Akcepto de la "Sankta Dekstro" en Gyula en 1938.⁽¹⁾



En 1944, la nuncio subskribis milojn de protektoleteroj, kiuj estis la oficiala diplomatia protekto de Vatikano por la persekutitaj.

Vilmos Apor portis sur sia koro ankaŭ la sorton de la civila loĝantaro. Li akceptis multajn homojn, loĝigis ilin, kaj helpis ilin finance. En aprilo 1944, post la bombado de Győr, li mem promenis sur la stratoj de la urbo por persone helpi al tiuj, kiuj bezonis. Li estis eltrovema kaj kuraĝa homo. Li havis fortan kontakton kun la gvidantoj de la monaĥejoj, kaj sukcesis trovi lokon por multaj rifuĝintoj.

La 28-an de marto 1945, Sanktan Merkredon, la rusa armeo atingis Győr. La retirigantaj germanoj ankaŭ pafis la urbon. La katedralo ankaŭ estis trafita. Episkopo Apor rigardis la detruon kaj ploris pri sia preĝejo.

Kiel bona paŝtisto, la episkopo akceptis ĉiujn rifuĝintojn en tiuj tagoj, kaj multaj centoj da ili trovis ŝirmejon en la keloj de la episkopa kastelo. Preta por ĉio, la episkopo de Győr deklaris: “Vi devas morti unu tagon, estas pli bone doni vian vivon en tiu tempo.”

La Sanktan Ĵaŭdon Vilmos Apor gvidis sian lastan meson en la kelo.

Rusaj soldatoj venis pli kaj pli ofte al la episkopa kastelo. La episkopo akceptis ĉiujn persone kaj tute ne dormis ĝis la Sankta Vendredo. En tiu tempo, ebriaj rusaj soldatoj volis forpreni la virinojn kaj knabinojn restantajn en la kelo. Vilmos Apor rezistis. Soldato unue pafis en la plafonon – la loko de la kvar kugloj daŭre povas esti vidata en la kelo, kiu estas konvertita en muzeon – kaj tiam pafis la episkopon tri fojojn. Virino, vidante lian sangantan frunton, kriis: “Nia patro episkopo, vi faris tion por ni!” Vilmos Apor respondis kviete kaj ridetante: “Volonte, tre volontel!”

La vundita ĉefpastro estis transportita tra la sieĝata urbo al la hospitalo, kie li estis operaciita per la lumo de kerosenlampo. Vilmos Apor dankis Dion pro tio, ke “donis al li tian Sanktan Vendredon” kaj dum siaj suferoj li preĝis por siaj pastroj, kredantoj kaj nia lando, kaj pardonis siajn atakantojn. Li mortis frumatene la 2-an de aprilo, Paska lundo.

Lia korpo estis provizore entombigita en la kripto de la Carmelite-preĝejo.

Lia konfesanto skribe petis, ke tuj komenciĝu la afero de beatigo de la martiriĝinta episkopo. La proceduro estis

komencita en 1946, sed oni devis suspendigi ĝin en 1949 kaj povis esti rekomencita nur en 1989.

Lia reentombigo povis okazi nur la 23-an de majo 1986, kaj de tiam li ripozas en unu kapelo de la baziliko Győr.

La preparlaboroj de la beatigo estis kompletigitaj antaŭ 1996. La tiel nomata pozicio – kiu enhavas ĉiujn dokumentojn necesajn por beatigo – estis transdonita en ornama bindaĵo al papo Johano Paŭlo la 2-a dum lia vizito al Győr en septembro 1996, kiam li preĝis ĉe la tombo de Vilmos Apor.

Unu jaron poste, la 9-an de novembro 1997 papo Johano Paŭlo la 2-a beatigis episkopon Vilmos Apor sur placo Sankta Petro en Romo, en ĉeesto de miloj da hungaraj pilgrimantoj.

Vilmos Apor estas unu el la plej gravaj ekleziaj figuroj en la historio de la Hungara Katolika Eklezio – kaj en la moderna hungara historio – kaj li merite okupas elstaran lokon en nia memorkulturo ne nur pro sia martireco, sed

ankaŭ pro sia paŝtista servado, kaj precipe pro sia laboro kiel episkopo.

Kvankam oni provis forviŝi lian personecon el la nacia historia konscio dum la jaroj de la partia ŝtato, lia kulto daŭre vivis – se nur en latentia formo – en pli malgrandaj ekleziaj komunumoj aŭ en la civila socio de Győr. La reĝimŝanĝo rompis tiun antaŭan silenton, alportante oficialan rekonon ankaŭ al Vilmos Apor.

Multaj homoj konas la nomon kaj personon de Vilmos Apor pro lia martireco. Tamen gravas substreki, ke li ne nur plenumis sian devon en unu momento, protektante la atakitajn virinojn, sed lia tuta vivo estis karakterizita de sinteno, kiu meritas respekton kaj elstarigis lin inter la pastroj de sia tempo.

✠

1) Je la 900-a datreveno de la morto de Sankta Stefano, la relikvo “Sankta Dekstro” (la dekstra mano de Stefano) estis transportita tra la lando en speciale konstruita trajno. Inter alie ĝi haltis en Gyula.

Johano Paŭlo la 2-a ĉe la tombo de Vilmos Apor



La trajno de la vivo

La vivo estas kiel trajnveturo,
kun ĉiuj haltejoj, kromvojoj kaj akcidentoj.
Ni eniras, renkontas niajn gepatrojn kaj pensas,
ke ili ĉiam kun ni vojaĝas,
sed ĉe iu haltejo ili eliras kaj
ni devas nian vojaĝon sen ili daŭrigi.

Tamen multaj pasaĝeroj eniras la trajnon,
niaj gefratoj, kuzoj, amikoj, eĉ la amo de nia vivo.
Multaj eliras kaj postlasas grandan malplenen,
ĉe aliaj ni ne rimarkas ilian foriron.
Estas vojaĝo plena kun ĝojoj, suferoj, salutoj kaj adiaŭoj.
Sukceso estas en tio, kun ĉiu havi bonan rilaton.

La granda enigmo estas: ni neniam scias,
ĉe kiu haltejo ni devas eliri.
Pro tio ni devas vivi, ami, pardoni
kaj ĉiam doni la plej bonon!
Tiam, kiam venos la momento kiam ni devas eliri
kaj nia loko estos malplena,
restu nur belaj pensoj pri ni kaj por ĉiam
plu vojaĝu en la trajno de la vivo

Mi deziras al vi, ke via vojaĝo ĉiun tagon pli beligas,
vi ĉiam amon, sanecon, sukceson
kaj monon havu en via pakaĵo.
Multan dankon al vi pasaĝeroj en la trajno de mia vivo!!!

Teksto adaptita kaj esperantigita de Siegfried KRÜGER, DE.

Noto:

Troviĝas multaj versioj de iu iama origina poemo, kiu estas plej ofte atribuita al la jenaj:
'*Die Busfahrt des Lebens*' (1996) de Manuela Thoma-Adofo aŭ '*Le train de ma vie*' el
L'Enfant qui attendait un train (2009) de Jean d'Ormesson aŭ '*The Train of Life*' de
James S. Tippet.

La Deklaracio de Barmen

Artikolo proponita de Siegfried KRÜGER, DE

La tekstojn tradukis Bengt Olof Åradsson, SE

La Teologia Deklaracio de Barmen estis verkita de grupo de ekleziestroj en Germanio por helpi kristanojn elteni la defiojn de la nazia partio kaj de la tielnomitaj *Germanaj Kristanoj*, popola movado, kiu vidis neniun konflikton inter kristanismo kaj la idealoj de la nazia socialismo de Hitler.

En januaro 1933, post frustraj jaroj en kiuj neniun registaro en Germanio povis solvi problemojn de ekonomia depresio kaj amasa senlaboreco, Adolfo Hitler estis nomita kanceliero. Ludante je la timo de homoj de komunismo kaj bolŝevismo, li povis persvadi la Parlamenton permesi al li regi per edikto. Ĉar li plifirmigis sian potencon, Hitler aboliciis ĉiujn politikajn rajtojn kaj demokratiajn procezojn: polico povis senprocese deteni homojn en mal-

liberejo, traserĉi privatajn loĝejojn sen mandato, kapti posedaĵojn, cenzuri publik-aĵojn, subaŭskulti telefonojn kaj malpermesi renkontiĝojn. Li baldaŭ malpermesis ĉiujn politikajn partiojn krom sia propra, frakasis sindikatojn, ‘purigis’ universitatojn, anstataŭigis la juran sistemon kun siaj propraj “Popolaj Tribunaloj”, iniciatis sisteman teruradon de judoj, kaj akiris la subtenon de ekleziestroj aliancitaj kun aŭ komprenema al la Germanaj Kristanoj (vidu apartan tekston).

La plej multaj germanoj prenis la unuiĝon de kristanismo, naciismo kaj militismo por koncedite, kaj patriotaj sentoj estis egaligitaj kun kristana vero. La Germanaj Kristanoj altigis la rase puran nacion kaj la regadon de Hitler kiel la volo de Dio por la germana popolo.

La movado de *Germanaj Kristanoj* akiris popularecon konstante post 1933. En Berlino, 565 pastroj de 147 protestantaj eklezioj kaj aliaj ekleziaj organoj identigis sin malkaŝe kun la Germanaj Kristanoj. Antaŭ 1938 la movado establis sin kiel elstara voĉo en la lando [Reich]. En dokumento la celoj kaj kredoj de la Germanaj Kristanoj estas klare deklaritaj. Ili volis unuigi ĉiujn kristanojn trans la protestanta konfeso malantaŭ la celoj kaj politikoj de la nazia ŝtato. Nur Hitler, laŭ la mondkoncepto de la Germanaj Kristanoj, povis unuigi germanojn malantaŭ la klara germana kompreno de kristanismo, iu kiu realigis la politikajn, religiajn, kaj rasajn komponantojn de naciismo.

La dokumento kun dudek kvin punktoj ankaŭ montras la streĉitecojn inter la Germanaj Kristanoj kaj tiuj, kiuj ne volis akcepti ĝian manipulado de eklezia doktrino. Konsiderinda nombro da protestantoj estis maltrankvilaj pro la volemo de la Germanaj Kristanoj kunfandi eklezian dogmon kun Nacisocialismo.

<https://tinyurl.com/yr5xucnf>

Tamen, kelkaj en la eklezioj rezistis. Inter tiuj malmultaj celkonsciaj ekleziestroj, kiuj kontraŭbatalis la kaptitecon de la eklezio al Nacisocialismo, estis pastroj Hans Asmussen, Karl Koch, Karl Immer, Martin Niemöller kaj teologo Karl Barth. Post kelkaj regionaj renkontiĝoj, tiuj viroj kunvenigis reprezentantojn de luteranaj, reformitaj, kaj unuiĝintaj komunumoj en Gemarke Church, Barmen, en la grandurbo de Wuppertal, en majo 1934. Inter la cent tridek naŭ delegitoj estis konsekritaj pastoroj, eklezianoj kaj universitataj profesoroj.

La ĉefobjekto estis diskuto de deklaracio por apelacii al la evangeliuj eklezioj de Germanio por stari firme kontraŭ la indulgemo de la Germanaj Kristanoj al

Nacisocialismo. La Teologia Deklaracio de Barmen enhavas ses proponojn, ĉiu citante el la Skribo, deklarante ĝiajn implicojn por la nuntempo, kaj malaprobante la falsan doktrinon de la Germanaj Kristanoj. La deklaracio proklamas la liberecon de la eklezio en Jesuo Kristo, kiu estas Sinjoro de ĉiu areo de la vivo. La eklezio obeas lin kiel la solan Vorton de Dio, kiu determinas ĝian ordon, diakonion kaj rilaton al la ŝtato.

La deklaracio estis diskutita kaj adoptita sen amendo kaj la Konfesanta Eklezio, tiu parto de la eklezio kiu kontraŭbatalis la Germanajn Kristanojn, kolektiĝis ĉirkaŭ ĝi.

<https://tinyurl.com/4p6bb8jb>

Salutvortoj de la Monda Konsilio de Eklezioj kaŭze de la 90a datreveno de la Deklaracio de Barmen

Germana eklezia deklaracio malakceptanta nazian politikon restas inspiro, diras ĝenerala sekretario de WCC (Monda Konsilio de Eklezioj).

En la 90a datreveno de la *Deklaracio de Barmen*, kie membroj de la Konfesanta Eklezio de Germanio kondamnis naziajn trudenirojn en la eklezian vivon, la ĝenerala sekretario de la Monda Konsilio de Eklezioj laŭdis ĝin pro tio, ke ĝi helpis al kristanoj de tiam kontraŭbatali subpremon kaj maljustecon.

En mesaĝo al la Evangelia Eklezio en Germanio (EKD) pastoro d-ro Jerry Pillay deklaris, ke “La Barmen Deklaracio servis kiel inspiro al kristanoj alfrontantaj tiranecon, maljuston kaj diskriminacion

por la eklezio malakcepti la asertojn de subpremaj reĝimoj kaj batali herezajn tendencojn ene de siaj propraj rangoj”.

La deklaracio estis eldonita en la lasta tago de sinodo, kiu renkontiĝis 29–31 majo 1934 en Barmen, distrikto de la grandurbo de Wuppertal en la Rejnlando. Estis alvoko al protestantoj malakcepti la politikojn de la tielnomataj “Germanaj Kristanoj”, kiuj subtenis Nacisocialismon kaj ĝian politikon en la eklezia vivo.

Ĝuste ĉar ni volas esti kaj resti fidelaj al niaj diversaj konfesioj, ni ne povas silenti, ĉar ni kredas, ke ni ricevis komunan mesaĝon por eldiri en tempo de komuna bezono kaj tento”, deklaris la sinodo en sia deklaro.

“Ni estas kunligitaj per la konfeso de la sola Sinjoro de la sola, sankta, katolika kaj apostola eklezio”, ĝi asertis.

D-ro Pillay, kiu venas el Sudafriko, rememoris kiel en sia lando la Barmen Deklaracio helpis inspiri la teologian reziston al rasapartismo.

La Deklaracio de Barmen, Pillay diris, estis “vere ekumena okazaĵo”, ĉar ĝi estis la unua komuna deklaro de reprezentantoj de luteranaj, reformitaj kaj unuiĝ-

intaj eklezioj en Germanio ekde la tempo de la reformado.

“Hodiaŭ, la Deklaracio memorigas nin pri la nedisigebla ligo inter la serĉado de la unueco de la eklezio kaj la bezono de komuna mesaĝo surbaze de nia fido kontraŭ tiraneco, milito kaj maljusto” Pillay skribis en sia letero al la estro de la Departemento pri Ekumenaj Rilatoj kaj Eksterlandaj Ministerioj de EKD.

<https://tinyurl.com/4uthztnt>

La Barmen deklaro

adaptita de Robert McAfee Brown, Kairos:

Three Prophetic Challenges to the Church, publikigita en 1990 fare de Eerdmans.

1. “*Mi estas la Vojo kaj la Vero kaj la Vivo; neniu venas al la Patro krom per mi.*” Johano 14:6

“*Vere, vere, mi diras al vi: Kiu eniras en la ŝafejon ne tra la pordo, sed aliloke suprengrimpas, tiu estas ŝtelisto kaj rabisto.. Mi estas la pordo; se iu tra mi eniras, tiu estos savita.*” Johano 10:1,9

Jesuo Kristo, kiel li estas atestita al ni en la Sankta Skribo, estas la sola Vorto de Dio, kiun ni devas aŭdi, kaj kiun ni devas fidi kaj obei en vivo kaj en morto.

Ni malakceptas la falsan doktrinon, ke la Eklezio povus kaj devus rekoni kiel fonto de sia proklamo, preter kaj krom ĉi tiu unu Vorto de Dio, ankoraŭ aliajn eventojn, potencojn, historiajn figurojn kaj verojn kiel la revelacio de Dio.

2. “*Kristo Jesuo, kiu fariĝis al ni saĝeco el Dio, kaj justeco kaj sanktigo, kaj elaĉeto.*” 1 Kor. 1:30

Kiel Jesuo Kristo estas la konsola deklaro de Dio pri la pardono de ĉiuj niaj

pekoj, tiel same, kun egala seriozeco, li ankaŭ estas la vigla anonco de Dio pri sia postulo pri nia tuta vivo. Per li venas al ni ĝoja liberigo el la sen-diaj ligoj de ĉi tiu mondo por libera, dankema servo al liaj kreitaĵoj.

Ni malakceptas la falsan doktrinon, ke povus ekzisti areoj de nia vivo, en kiuj ni ne apartenus al Jesuo Kristo sed al aliaj sinjoroj, areoj en kiuj ni ne bezonus pravigon kaj sanktigon per li.

3. “*sed parolante la veron en amo, ni ĉiel kreskadu en tiun, kiu estas la kapo, Kristo, el kiu la tuta korpo [estas] kunigita.*“ Ef. 4:15-16

La Kristana Eklezio estas la komunumo de fratoj en kiu, en Vorto kaj sakramento, per la Sankta Spirito, Jesuo Kristo agas en la nuntempo kiel Sinjoro. Kaj kun sia fido kaj sia obeemo, kaj kun sia mesaĝo kaj sia ordo, ĝi devas atesti en la mezo de la pekplena mondo, kiel la Eklezio de pardonitaj pekuloj, ke ĝi apartenas al li sole kaj vivas kaj povas

vivi per lia konsolo kaj sub lia direkto sole, atendante lian aperon.

Ni malakceptas la falsan doktrinon, ke la Eklezio povus havi permeson transdoni la formon de sia mesaĝo kaj de sia ordo al ĉio, kion ĝi mem dezirus aŭ al la sortoŝanĝoj de la regantaj ideologiaj kaj politikaj konvinkoj tiamaj.

4. *“Vi scias, ke la regantoj de la nacioj kondutas kiel sinjoroj super ili, kaj iliaj granduloj ekzercas aŭtoritaton super ili. Ne tiel estos inter vi; sed kiu volas esti granda inter vi, tiu estu via servanto;”* Mat. 20:25-26

La diversaj oficoj en la Eklezio ne provizas bazon por kelkaj ekzerci aŭtoritaton super aliaj sed por la diakonio kun kiu la tuta komunumo estis konfidata kaj ŝargata por esti efektivigita.

Ni malakceptas la falsan doktrinon ke krom ĉi tiu diakonio/pastra ofico, la Eklezio povis, kaj povus havi permeson, doni sin aŭ permesi al si ricevi specialajn gvidantojn [Führer] vestitajn kun reganta aŭtoritato.

5. *“Dion timu. La reĝon honoru.”* 1 Pet. 2:17

La Skribo diras al ni, ke per dia nomumo la Ŝtato, en ĉi tiu ankoraŭ neelaĉetita mondo, en kiu troviĝas ankaŭ la Eklezio, havas la taskon konservi justecon kaj pacon, tiom kiom la homa prudento kaj homa kapablo ebligas tion, per la minaco kaj uzo de forto. La Eklezio agnoskas kun dankemo kaj respekto al Dio la profiton de ĉi tio, lia nomumo. Ĝi atentigas pri la Dia Regado, la ordono kaj justeco de Dio, kaj kun ĉi tiuj la respondeco de tiuj, kiuj regas kaj de tiuj, kiuj estas regataj. Ĝi fidas kaj obeas la potencon de la Vorto, per kiu Dio subtenas ĉion.

Ni malakceptas la falsan doktrinon, ke preter sia speciala komisiono la Ŝtato devus kaj povus fariĝi la sola kaj totala ordo de la homa vivo kaj tiel plenumi ankaŭ la alvokiĝon de la Eklezio.

Ni malakceptas la falsan doktrinon, ke preter sia speciala komisiono la Eklezio devus kaj povus preni sur sin la naturon, taskojn kaj dignon kiuj apartenas al la Ŝtato kaj tiel fariĝi sin organo de la Ŝtato.

6. *“Kaj jen mi estas kun vi ĉiujn tagojn, ĝis la maturiĝo de la mondaĝo.”* Mat. 28:20;

“La Vorto de Dio ne estas katenita.” 2 Tim. 2:9

La komisiono de la Eklezio, kiu estas la fundamento de ĝia libereco, konsistas en tio: anstataŭ Kristo, kaj do en la servo de sia propra Vorto kaj laboro, liveri al ĉiuj homoj, per predikado kaj sakramento, la mesaĝon de la libera graco de Dio.

Ni malakceptas la falsan doktrinon, ke kun homa vanteco la Eklezio povus meti la Vorton kaj laboron de la Sinjoro en la servon de memelektitaj deziroj, celoj kaj planoj.

La Konfesa Sinodo de la Germana Evangelia Eklezio deklaras, ke ĝi vidas en la agnosko de tiuj veroj kaj en la malakcepto de tiuj eraroj la nemalhaveblan teologian bazon de la Germana Evangelia Eklezio kiel konfederacio de Konfesantaj Eklezioj. Ĝi alvokas ĉiujn, kiuj povas solidare kun ĝia Deklaro, ke ili atentu ĉi tiujn teologiajn trovojn en ĉiuj iliaj decidoj koncerne Eklezion kaj Ŝtaton. Ĝi alvokas ĉiujn koncernatojn reveni al unueco en fido, espero kaj amo.

<https://tinyurl.com/mrj4apez>

Revolucio de digno

A
n
t
a
ŭ

10

j
a
r
o
j

La Revolucio de Digno, ankaŭ konata kiel la *Majdana Revolucio*, okazis en Ukrainio en februaro 2014 ĉe la fino de la Eŭromajdano-protestoj, kiam mortigaj bataloj inter manifestacianoj kaj la sekurecaj taĉmentoj en la ukraina ĉefurbo Kievo kulminis per la elpelo de elektita ukrainia prezidanto Viktor Janukoviĉ kaj la demisiigo de la ukraina registaro de ĉefministro Mikola Azarov.

En novembro 2013, ondo de grandskalaj protestoj (konataj kiel *Eŭromajdano*) erupciis en respondo al la subita decido de prezidanto Janukoviĉ ne subskribi asociigan kaj liberkomercan interkonsenton kun la Eŭropa Unio (EU), anstataŭe elektante pli proksimajn ligojn al Rusio kaj la Eŭrazia Ekonomia Unio. La ukraina parlamento *Verĥovna Rada* kun grandega plimulto aprobis fini la interkonsenton kun EU. La registaro de Rusio faris premon sur Ukrainion por mal-

akcepti ĝin. Tiuj protestoj daŭris dum monatoj kaj ilia amplekso larĝiĝis, kun alvokoj por la eksigo de Janukoviĉ kaj la tiutempa ukraina registaro de ĉefministro Mikola Azarov. Manifestacianoj kontraŭbatalis tion, kion ili vidis kiel ĝeneraligita registara korupto kaj povomisuzo, la influon de ukrainaj komercaj oligarkoj, polica brutaleco kaj malobservo de homaj rajtoj en Ukrainio. Kontraŭprotestaj leĝoj nutris plian koleron. Granda, barikadita protesta tendaro okupis la Sendependecan placon (*Majdan Nezaleŝnosti*) en centra Kievo.

En januaro kaj februaro 2014, bataloj en Kievo inter manifestacianoj kaj la speciala polica unuo *Berkut* rezultigis la mortojn de 108 manifestacianoj kaj 13 policistoj, kaj la vundiĝon de multaj aliaj. La unuaj manifestacianoj estis mortigitaj en furiozaj bataloj kun la polico la 19-an ĝis 22-an de januaro. Sekve de tio, manifestacianoj okupis registarajn konstruaĵojn ĉie en la lando. La plej mortigaj bataloj okazis la 18-an ĝis 20-an de februaro, kiuj rezultigis la plej severan perforton en Ukrainio post kiam la lando reakiris sendependecon.

03



Manifestacianoj batalantaj kontraŭ registaraj trupoj sur la Sendependeca placo en Kievo la 18-an de februaro 2014.

Fotis: Mstyslav Chernov,
CC BY-SA 3.0 Wikipedia

Informoj

Grava atentigo !

Ĉar estis Universala Kongreso en
Brno ŝovita semajnon pli poste,
decidis KELI-estraro okazigi
Kristanan Kongreson en la tagoj
19.–26.7.2025 en Pardubice.

Ĉiuj aliaj informoj kaj aliĝilo validas.
Pliajn informojn ĉe sekretario kaj
organizanto Pavel Polnický.
(Kontaktelecojn vidu sur paĝo 118)

Vidu ankaŭ *Gazetarajn komunikojn de UEA*:
<https://tinyurl.com/4btek2ch>

Aperis jam la stel' matena

Der morgenstern ist aufgedrungen

1. A - pe - ris jam la stel' — ma -
 2. Ek - so - nas kant' de l' an - ĝe -
 3. Vin, ho Ma - te - na Stel', — ni

te - na, he - rold' de no - va lum' se -
 la - ro him - nan - te pri l' mi - rin - da
 glo - ras. Je - su - o Krist', ni Vin a -

re - na. Ĝi bri - las su - per mont' kaj
 fa - ro, ke Di - o ve - nas de l' ĉi -
 do - ras. Ni be - nas Vin kun gran - da

val', — ra - di - as su - per
 el', — por le - vi nin al
 ĝoj', — Vin, Di - a lum' sur

bet - - - le - ĥe - - - ma stal'.
 Si - - - a Di - - - a hel'.
 ni - - - a vi - - - vo - voj'.

DER MORGENSTERN IST AUFGEDRUNGEN • EG 69, tie ankaŭ 4-voĉa • Altenberger Singebuch 6a eldono, Freiburg 1953, p. 9 • M: 15a jarcento, religie ĉe Daniel Rumpius (Daniel Rump, 1549 - ĉ. 1600) 1587 • 4-voĉa arango (kaj el ĝi la akordoj): Michael Prætorius (1571-1621) en Musæ Sionæ 1609 • germana T: ĉe Daniel Rumpius 1587, prilaborita de Otto Riethmüller (1889-1938) 1932 • E (rekte el Rump): Albrecht Kronenberger 2018-01-05